# 15-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo en Tossa de Mar (Girono) Katalunio (Hispanio) De la 29a de septembro ĝis la 6a de oktobro 2007

En la numero 136 aperis raporto pri la 14a Internacia Esperanto-Semajno en Katalunio. Jen ni jam ricevis informojn pri la ĉi-jara aranĝo, kiu okazos ĉi-foje en Tossa de Mar. Supozeble ankaŭ vi ŝatus ĝui tian aranĝon kaj kvazaŭ plilongigi la somerajn feriojn. Jen kelkaj bidoj pri la loko TOSSA DE MAR, pri la 3-stela hotelo PARK HOTEL, kie okazos la tuta aranĝo. Vi trovas ĉi-apude la korespond-adreson de la ĉefa organizanto kaj ĉi-sube la tre favorajn kostojn.

## ALIĜ-KOTIZOJ

Ĝis la 31-a de julio 20 eŭroj  
Post la 31-a de julio 25 eŭroj  
Gejunuloj ĝis 25 jaroj senpage


Nia hotelo en Tossa de Mar →

## PREZOJ por kompleta pensio:

32 eŭroj en dulita ĉambro po persono kaj tago.  
42 eŭroj en unulita ĉambro (por unu persono) po tago.  
Okaze de ne-partopreno la kotizo ne estos repagebla. sed ĝi validas por venontjara « semajno »

**ATENTU:** la Semajno komenciĝas la 29-an de septembro je la 11-a h. kaj finiĝas la 6-an de oktobro je la 11-a h. (do, de sabato al sabato)

**15-A INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO**  
OKAZONTA EN TOSSA DE MAR (GIRONA) (KATALUNIO) HISPANIO.  
HOTELO PARK HOTEL\*\*\*STR. GIVEROLA 4  
de la 29-a de septembro ĝis la 6-a de oktobro 2007.  
Koresponda adreso: Luis Serrano Pérez  
Apartat 423. ES - 08200 SABADELL (Hispanio)  
Tel. (+34) 93 727 50 21  
Retadreso: [luis\\_serrano@miomail.com](mailto:luis_serrano@miomail.com)  
<http://personales.ya.com/semajno>



## OSIEK-Konferenco 2007

Pazarĝik, Bulgario, 14a-20a de julio

*Mitoj kaj legendoj*

Atribuado de OSIEK-premio 2007  
postkonferencaj ekskursoj dum tri tagoj

Informoj, aliĝoj: Georgi MIHALKOV (Julian Modest)

☎ (02) 934-42-55 ☒ [modest@abv.bg](mailto:modest@abv.bg)

Eric LAUBACHER: ☎ +33 1 30 96 67 91 ☒ [kasisto@osiek.org](mailto:kasisto@osiek.org)

<http://osiek.org>



# 60-a JUBILEA KULTURA SEMAJFINO de S.Ĝ.L.

( 8a – 10ajn de decembro )

## SARLANDA ESPERANTO - LIGO,

Ĝi okazis en HOMBURG ( proksimume 50 kmjn for de SAARBRÜCKEN ...) Dum du tagoj mi travivis ĝojajn spertojn ..

La organizantoj sukcesis interesigi ĉiujn, el la preskaŭ 40 ĉeestantoj, pri Japanio, kiu estis la temo de tiu kultura aranĝo. Tiun temon ili elektis pro la venonta UK en YOKOHAMO en 2007.

Vendrede vespere, filmo estis anstataŭigita per kantoj pri Advento kaj Krisnasko, kiujn majstre gvidis pastro *Kronenberger*.

Sabatan tagon... programo plenplena !

Matene oni povis elekti inter :

- vizito al bredejo de japanaj "KOI"- fiŝoj
- prelego pri geografio de Japanio.

Posttagmeze, profesoro *Markus A. Gross* majstre, dum 3 horoj, klarigis pere de lumbildoj, historion , klasfonon, la fonetikon eĉ la skribadon de la japana lingvo... zumis iomete la kapoj ...

Aliaj ĉeestantoj trejnigis pri japana kaligrafio, arto de paperfaldado Origami.

Religiaj enpartoprenantoj ĉeestis Di-servon kun pastro *Albrecht Kronenberger* en la kapelo de la *Domo Kardinal Wendel*, domo, kiu ankaŭ akceptis nin dum la semajfino.

Poste mirinda "*Granda Japana Vespero*" disvolviĝis en salono, teknike instalita de pluraj esperantistoj de Sarlando. *Martin Thorenz* kaj *Takajo Waltz* prezentis la karajn jesajn



repondantojn al invito de Takajo.

Japanaj muzikantoj el najbaraj urboj ludis diversajn muzikojn, ĉu klasikajn, ĉu tipe malnovajn . Ĉiuj admiris la du muzikantinojn, kies belsonajn melodiojn prezentis *Ŝo* kaj *Rjŭteki*.

Ni ne forgesu la du knabinojn vestitajn per bela kimono, kiuj pianoludis, kaj mirindan infanokoruson, kiu belsone *Novjaro, Sapbobeloj. ktp...* kantis. Ankaŭ ili ricevis grandegan aplaudon.

Japana Kvizo, prezentita sur ekrano, cerbumigis nin, kaj pluraj gajnis premion ( belan libreton ). Bonajn, lertajn, rapidajn japanajn *sindefendajn lukto-sportojn* ni spektis.

Poste, ĉe tabloj en la koridoro kaj en kampara trinkejo, laŭ elekto, okazis familia amika kunestado.

Dimanĉe, sub gvidado de *Martin* kaj japanino *Katsuyo*, dek geesperantistoj malkovris la suŝio-arton dum la aliaj partoprenantoj aŭskultis prelegojn de sinjoro *Makabe* pri japana literaturo kaj esperanta movado en Japanio.

Kiel kutime, grupfoto de la partoprenantoj okazis en la korto malgraŭ malvarmeta vetero .

*Oliver Waltz*, prezidanto, kiu devis foriri pro laboro, transdonis la torĉon al vicprezidanto *Edgar Müller* por diri finajn vortojn. Emocigitaj, ni ankaŭ aŭskultis la oldulon *Becker* raportoj pri disvastigo de Esperanto en Saarlando inter la du militoj. Ĉiuj geknaboj lernis tiutempe la lingvon en lernejoj.

Mi, franca, aldonas ke, en la sama tempo ĝis 1936, kiam la *Popola Fronto* registaris, ministro pri edukado *Léon Bérard* malpermesis kursojn en lernejoj, eĉ post la lernejo tempo ...

Mi devas ankaŭ mencii la proponon de kursoj por komancantoj, gviditaj de *E Müller*, kaj por progresantoj gvidataj de *H. Fillmann*.

Belan memoraĵon mi gardos .




*Jocelyne Monneret* .  
Saint Rémy  
Espéranto en chalonnais  
Francio

# Internacia Seminario en Wewelsburg

## Sango bolas, juneco petolas... fragmentoj kolektitaj dum la IS 2006/ 07

Tiel diris jam majstro Zamenhof. Sed kio fakte bolis, kiel oni petolis dum la ĵus pasinta IS en Wewelsburg?

Bolis la kantemo de la katalunoj kiuj foje sufiĉe spontane muzikumis kaj ensorĉis ĉies orelojn per naciaj kantoj arde prezentataj. Bolis la aŭto-motora de la muzika bando *Esperanto Desperado*, kio malebligis tro rapidan forvojaĝon al la IF. Bolis la helpemo de kunorganizanto: por ke neniu ie perdiĝu, li fiksas nekredeble multajn vojmontrilojn ĉie ekster kaj ene de la junulargastejo. Bolis multegaj gamboj dum la ĉiuvesperaj ege bonkvalitaj koncertoj (i.a. de *JoMo*, *Esperanto Desperado*, *Dolchamar*). Bolis ankaŭ la moviĝemo de kelkaj memzorgantoj por kompensi la portempan malfunkciadon de la hejtilo en ilia dormejo, nome gimnastika halo.



Kaj kia petolado troveblis? Ĉu ludadon

de danaj kristnasko-kantoj per bekflutoj, meze en la koridoro, oni nomu tia? Ĉu la moveblan redaktejon de la t.n. murgazeto, kies aktivuloj ĉiutage surmurigis novan eldonon pri la plej aktualaj okazintaĵoj en la IS-ejo? Ĉu la ne ĉiam laŭvortan tradukon dum la urbogvidado tra Paderborn, kiu pli perceptebligis la proprajojn de la urbanoj? Ĉu la improvizitan kostumon de la brazilaj gastoj dum la mezepoka kostum-konkurso kiam ili simple surskribis ĉiujn korperojn per la koncerna vorto kun atentigo pri ties mez-epokeco? Aŭ ĉu eble la stultetan marionetan ludon, per kies dua parto kelkaj francoj ripetis sian lastjaran sukceson?

Ĉu tamen eblis anticipi bloveton da matureco

ĉirkaŭ la partoprenantaro? Mi dirus ke jes. Ĉefe pro la nazia epoko en la kastelo kaj vilaĝo de Wewelsburg: Multaj aliĝis al la gvidadoj tra la apuda dokumentarejo kaj prelege ensorbis informojn pri la iama surloka agado de la SS. Ĝenerala lernemo ankaŭ manifestiĝis per la vigla partopreno en divers-kampaj kursoj, ĉu pri mezepokaj dancoj, unua helpo, stenografio, ludoj aŭ slojdado – kondiĉe ke la kursoj ne okazu frumatene, kompreneble. Por esperantlingve progresi oni devis ellitiĝi jam pli frue – sed la sukcesaj partoprenantoj de la GEI-ekzamenoj pruvis, ke tio ja indas.

Interesiĝo same rimarkeblis dum multaj prelegoj kaj diskut-rondoj, i.a. pri religiaj baroj, la pedagogio de Waldorf kaj la laboro en junula malliberejo. La programo inkluzivis krome posttagmezon en naĝejo, novjaran koncerton kaj internacian vesperon. Kompreneble ne mankis movadaj programeroj. Kaj oficialaĵo. Mi menciuj nur la jar-ĉefkunvenon de GEJ kaj precipe atentigu pri la jubilea tago kiam multaj iamaj IS-aktivuloj travivis posttagmezon plenan je rememorigoj bildaj kaj rakontaj. Martin Haase, Ziko van Dijk kaj Helmut Klünder revivigis la lastajn jardekojn per siaj kontribuoj.

"Kaj kio pri la noktoj?" vi demandos. Kiel ĉiam invitis la diskejo, trinkejo, gufujo, ludejo, kinejo... estas malfacile decidi, kio plej allogis. Ĉu do la sama procedo kiel lastjare? Parte jes, certe. Sed ankaŭ aldoniĝis novaĵoj kiel la IKF, t.e. la Internacia Kulinara Festivalo al kiu multaj kontribuis ofertante kunportitajn lokajn specialaĵojn.

Kiuj informoj mankas? Ĉu tiel sobraj kiel statistikaj? Ĉu ke la nombro de partoprenantoj pli altiĝis tagon post tago, tiel ke dum la silvestra kulmino ĉeestis ĉirkaŭ 200 esperantistoj el 26 landoj, duone germanoj, duone alilandanoj, inter ili azianoj kaj nord- kaj sudamerikanoj? Ĉu la konstato, ke la amaso da kunorganizantoj okulkrape sukcesis starigi plaĉan seminarion kaj trovis indan ejon por la jubilea IS? Ĉu ke tia renkontiĝo same dependas de la kunlaboro de ĉiuj gastoj? Ĉu ke multaj iel aktivis kaj ke aliaj simple ĝuis la programon? Ĉu ke la etoso bonegis kaj ĉiuj kontentis?

IS (Internacia Seminario) estas aranĝo por gejunuloj iom simila al IF (Internacia Festivalo). Ĝi okazas en la sama periodo de la jaro, nome de la 27a de decembro ĝis la 3a de januaro. Ni kore dankas al Jessica Dehms, kiu bonvolis komuniki al ni sian tre interesan raporton pri la lasta IS en Wewelsburg. Pliaj fotoj pri tiu IS estas videblaj en ŝia retejo: <http://www.fotoalbum.dds.nl/papilion>



„Ĉu ankoraŭ juna?“ - jen la tema demando de la 50a Internacia Seminario. Leginte la ĵusan komenton – ĉu vi vere opinias, ke io ŝanĝiĝis dum la pasintaj 50 jaroj?

Jessica Dehms

**"Samarkando en Ĉiuj Kontinentoj"**

Jubilea Internacia Ekspozicio

Viaj kontribuoj atendataj !

En aŭgusto 2007, urbo **Samarkando** oficiale kaj solene festos sian **2750-jariĝon** subaŭspicio de UNESKO.

Por celebri la gloran jubileon de la mondfama urbo, la **Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro** kaj la **Ioka E-klubo** kolektas ĈIUSPECAJN kaj ĈIULINGVAJN materialojn ( gratul-leterojn, vojaĝ-rakontojn, gazet-artikolojn, librojn, broŝurojn, poemojn, kantojn, citaĵojn, fotojn, desegnaĵojn, dokumentojn, ktp ) pri Samarkando kaj samarkan-anoj !

Fakte, ĈIO AJN pri la temo, inkluzive fotojn kaj / aŭ informojn pri la hoteloj, restoracioj, vendejoj, stratoj, komunumoj, firmaoj, varoj, librotitoloj, artaĵoj ktp, portantaj la nomon "Samarkand", estos TRE bonvena

La projekto estas realigata kunlabore kun la **Samarkandaj Ŝtataj Muzeoj**. La plej interesajn materialojn ni publikigos en nialanda gazeto. ĈIUJ ricevitaj kontribuoj estos agnoskitaj kaj eksponataj en la internacia ekspozicio en *Samarkanda Ŝtata Muzeo pri Historio de Kulturo kaj Artoj* de Uzbekistano. Estas ankaŭ planate eldoni specialan jubilean libron.

Anticipajn dankojn por via kunlaboro kaj afabla subteno !

Bonvolu adresi viajn kontribuojn laŭeble baldaŭ al:

**Anatoli Ionesov,**Direktoro *Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro*

P. O. Box 76,

**UZ - 140100 Samarkand**

Respubliko Uzbekistano

Telefono/ fakso: +998 (66) 233 17 53.

<http://www.aliaflanko.de/urbo/samarkand/muzeo.html><http://www.civilsoc.org/nisorgs/uzbek/peacemsm.htm><http://peace.museum.com> <http://peacetur.freenet.uz>[http://www.esperanto-sat.info/article.php?id\\_article=357](http://www.esperanto-sat.info/article.php?id_article=357)Retadreso: [imps86@yahoo.com](mailto:imps86@yahoo.com)

Reprezo kaj nacilingvaj tradukoj dezirataj.

Bonvolu, se eble, pludoni informojn pri tiu ĉi projekto al viaj amikoj kaj kolegoj.

**"Samarkand dans tous les continents"**

Exposition Internationale Jubilaire

Nous comptons sur vos contributions !

Au mois d'août 2007, la ville de **Samarkand** fêtera officiellement, dans la solennité, son 2750<sup>ème</sup> anniversaire, sous les auspices de l'UNESCO.

Pour célébrer le glorieux jubilé de cette ville connue dans le monde entier, le **Musée International de la Paix et de la Solidarité** et le **club local d'Espéranto** recueillent des éléments de toutes sortes dans toutes les langues: lettres de félicitations, récits de voyages, articles de presse, livres, brochures, poèmes, chants, citations, photos, dessins, documents divers sur Samarkand et les Samarkandais.

Tout ce qui pourra évoquer l'évènement, y compris des photos d'hôtels, de restaurants, de marchés, de diverses communautés et d'entreprises, titres de livres, objets d'art avec le nom de Samarkand ou s'y rapportant ( même vos propres trouvailles sur le *net* ), sera très apprécié.

Le projet est réalisé avec la collaboration du **Musée National de Samarkand**. Les documents les plus intéressants seront publiés dans notre presse nationale. Toutes les contributions que nous recevrons seront enregistrées et exposées au Musée National de Samarkand consacré à l'histoire de la Culture et des Arts d'Ouzbékistan. On envisage aussi d'éditer un livre spécial du Jubilé.

Merci d'avance pour votre contribution et votre aimable soutien.

Ayez l'obligeance d'envoyer votre contribution le plus tôt possible à :

**Anatoli Ionesov,**Directeur du *Musée International de la Paix et de la Solidarité*

P. O. Box 76,

**UZ-140100 Samarkand** Ouzbékistan


Téléphone/Fax: +998 (66) 233 17 53.

Courriel:

[imps86@yahoo.com](mailto:imps86@yahoo.com) <http://peace.museum.com><http://www.museum.com>[com/jb/museum?id=26810&show=10&event=4103](http://www.museum.com/jb/museum?id=26810&show=10&event=4103)

Reproduction et traduction en langues nationales souhaitées.

Ayez l'amabilité de diffuser, si possible, auprès de vos amis et collègues, les informations concernant ce projet.



## Francaj Esperantistoj Silkvojas en Uzbekistano

Dum lastaj jaroj Esperanto ĉiam pli ofte sonas en 2750-jara Samarkando kaj en aliaj turismaj centroj de Uzbekistano. Lauinvite de la *Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro* ĉi-tien alvenas Esperanto-karavanoj kaj ankaŭ individuaj esperantistoj el diversaj partoj de la mondo. Pere de la Lingvo Internacia la vojaĝantoj malkovras la landon, ties mondkonatajn vidindaĵojn, kulturon, tradiciojn kaj nunan vivon de uzbekistananoj kaj, kompreneble, konatiĝas kun loka E-movado, praktikante ĉiutage Esperanton. Cetere, peresperanta ekskursado estas ne nur agrabla kaj interesa kleriga okupo, sed samtempe efika formo de lingva perfektigo (egale por karavananoj kaj lokaj esperantistoj!) kaj grava faktoro de publika priesperanta informado.

Autune 2006 venis la dua franca E-karavano el departemento *Drôme*, plejparte membroj de E-klubo "*Bona Stelo*" el *Romans-sur-Isère*. La karavanon organizis s-ino Monique FILLAT el Mours, sed la vojaĝitineron kaj ties programon plene prizorgis samarkandaj E-aktivuloj. Dum 11-taga vojaĝo la karavananoj loĝis en 'karavan-saraj'-stilaj privataj hoteloj, abunde ekskursis tra antikvaj urboj kaj vilaĝoj de Uzbekistano, grimpis kaj piknikis en montaro, vizitis laborejojn de konataj metiartistoj, la Muzeon pri Historio de Vinfarado, partoprenis geedziĝfeston, ceremonion de gustumado de famaj uzbekaj vinoj kaj konjako en Samarkanda vinfabriko, eĉ iom rikoltis kotonon... En Samarkanda Ŝtata Kulturhistoria Muzeo francaj samideanoj konatiĝis kun la letervespera ekspozicio «*La Mondo Gratulas Uzbekistanon*» organizita de Samarkanda Pacmuzeo kaj loka E-klubo.

Okazis ankaŭ interkonaj vesperoj kun esperantistoj de Samarkando kaj Taŝkento, kiujn ĉeestis ankaŭ kelkaj japanaj kaj italaj turistoj, ekinteresiĝintaj pri la nekonata por ili lingvo. Supozeble postrevene hejmen ili eklernos Esperanton au almenaŭ fariĝos ties amikoj. En kortuŝa internacia 'rondo familia' sonis Esperantaj, uzbekaj, rusaj, japanaj kaj italaj kantoj, kiuj finfine dancigis la ĉeestantojn...

S-ino Waltraud Legros per ĉi-subaj vortoj resumis vojaĝimpresojn de la karavananoj: «*Ni ĉiuj estas tre, tre kontentaj pri tiu mirinda vojaĝo al Uzbekistano kaj ni ĉiuj ankaŭ estas kortuŝitaj per via ega afableco kaj ĉiu via laboro por fari tiun ĉi vojaĝon neforgesebla paĝo en niaj vivoj! Koregan dankon al vi!*»

Jen niaj kontaktaj koordinatoj por organizontoj de novaj ( ĈIAM bonvenaj ! ) E-karavanoj kaj por individuaj vojaĝemuloj:

*Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro,*


P.O. Box 76, UZ - 140100 Samarkando, Respubliko Uzbekistano.


Telefono/ fakso: +998 (66) 2331753.

Interreto : <http://www.aliaflanko.de/urbo/samarkand/muzeo.html>

Retadreso : [imps86@yahoo.com](mailto:imps86@yahoo.com)

Anatoli Ionesov ( Uzbekistano )





## La presse et le problème des langues

... L'anglais boudé par les candidats français ...

(NB – de la rédaction : ... à la présidence de la République ...)

<http://www.letemps.ch/template/courrier.asp?page=21&article=198736>

De Jean Martin, député au Grand Conseil vaudois, Echandens (VD) - Mercredi 24 janvier 2007 »...

« ... Je suis abasourdi par le fait, évoqué ces jours, que autant Ségolène Royal que Nicolas Sarkozy sont très limités dans leur connaissance et pratique de la langue de Shakespeare. . . Une certaine vision de la grandeur de la France demande peut-être que ses chefs tiennent en piètre estime la langue des *gentlemen farmers* (ou *farmers* tout court) d'outre-Manche et celle des businessmen américains.

La question qui préoccupe est de savoir comment il est possible que ces personnes, pas vieilles, ayant passé par l'ENA ou des filières comparables, ont pu arriver où elles sont sans maîtriser l'anglais ( pour le moins, qu'elles le comprennent complètement si elles ne veulent pas le parler). [ . . . ]

Et la réciprocité, dira-t-on? Que les Anglo-Saxons apprennent notre langue! Oui, si on en reste à des effets de manches d'orgueil linguistico-national, mais la prééminence de l'anglais est un fait de la vie. Contester l'évidence revient à se frapper la tête contre les murs et ce faisant on finit par se faire mal. De plus, j'ai souvent observé que les ressortissants de pays où on est souvent polyglottes ( pays scandinaves, Pays-Bas, et Suisse bien entendu ) ont un vrai avantage sur les monomanes d'une langue comme le sont le plus souvent les Américains, et comme le sont encore, mais dans une position de claire infériorité trop de nos amis français.

Sans doute voit-on mal que la connaissance des langues constitue un préalable aux choix politiques des peuples souverains. Il reste que, chez nous par exemple, les parlementaires fédéraux - mais aussi les Conseillers d'Etat - qui ne parlent pas allemand ont de vraies difficultés et sont évidemment moins, voire inefficaces sur la scène nationale.

Alors, outre-Jura, imaginer un(e) président(e) de la République qui n'est pas capable de parler aisément avec ses homologues anglophones d'autres pays autrement que par le canal d'un interprète apparaît véritablement incroyable ( et on se souvient de la formule *traduttore – traditore* ). [ . . . ]

Voici ma réaction à chaud :-)



“... Madame, Monsieur,

Il m'arrive de lire les articles sur votre site, que je crois intéressant et instructif. Cependant l'article de Jean Martin intitulé "*L'anglais boudé par les candidats français*" me laisse abasourdie.

Depuis quand le critère principal, sinon un des plus importants, pour les futurs candidats à la présidentielle serait leur connaissance de l'anglais ? . . . Et ne devraient-ils pas s'occuper des intérêts non des "*gentlemen farmers*" ou des "*businessman*" ( qui ont leurs propres présidents, gouvernements etc. ) mais de ceux du peuple français. Ne confondons pas les choses, chacun son

métier...

Un passage méritoire :

*"De plus, j'ai souvent observé que les ressortissants de pays où on est souvent polyglottes (pays scandinaves, Pays-Bas, et Suisse bien entendu) ont un vrai avantage sur les monomanes d'une langue comme le sont le plus souvent les Américains - et comme le sont encore, mais dans une position de claire infériorité - trop de nos amis français. "*

Quel avantage? Déjà, les exemples cités concernent, soit les petits pays ( nordiques, Pays-Bas, qui sont obligés d'apprendre une langue dominante, c'est la réalité de leur vie ), soit la Suisse qui est un pays à part du point de vue linguistique ( et où, sans vouloir vexer personne, l'anglais progresse rapidement, perçu comme "neutre" ). Ensuite, malgré les efforts consentis à l'apprentissage de l'anglais, il est difficile, voire impossible d'atteindre le niveau des natifs. Sans oublier les conséquences graves pour les langues de ces pays : le vocabulaire scientifique dans les pays scandinaves est en voie de disparition, à force d'enseigner les matières directement en anglais, sans apporter plus de performances aux élèves... je vous invite à consulter ces documents :

<http://svenskaakademien.se/litiuminformation/site/page.asp?Page=1&IncPage=242> <http://www.sweden.gov.se/content/1/c6/03/74/78/95862bf9.pdf> [http://www.breizh.info/breizh/sections/international/langues\\_vikings\\_en/view...](http://www.breizh.info/breizh/sections/international/langues_vikings_en/view...)

Ce danger est reconnu même par la Commission européenne :

*"Les établissements d'enseignement supérieur pourraient jouer un rôle plus actif dans la promotion du multilinguisme auprès des étudiants et du personnel, mais aussi au sein de la communauté locale au sens large. Il convient d'admettre que la tendance, dans les pays non anglophones, à enseigner en anglais au lieu de la langue nationale ou régionale peut avoir des conséquences imprévues pour la vitalité de ces langues. "* Bruxelles, le 22. 11. 2005, COM(2005) 596 - final, COMMUNICATION DE LA COMMISSION AU CONSEIL, AU PARLEMENT EUROPÉEN, AU COMITÉ ÉCONOMIQUE ET SOCIAL EUROPÉEN ET AU COMITÉ DES RÉGIONS - Un nouveau cadre stratégique pour le multilinguisme, page 7.

« Alors, outre-Jura, imaginer un(e) président(e) de la République qui n'est pas capable de parler aisément avec ses homologues anglophones d'autres pays autrement que par le canal d'un interprète apparaît véritablement incroyable... Et pour discuter avec ses homologues sinophones, il faut maîtriser le chinois ?... puis le russe pour les homologues russes ?... et l'espagnol pour les pays hispaniques ?... Un président n'est pas un linguiste ni un traducteur !

Et en revenant aux traducteurs, la formule "traduttore - traditore" est usée jusqu'à la corde et employée à mauvais escient. Cela signifie juste qu'il existe des formules intraduisibles d'une langue à l'autre, mais elles ont minoritaires et absentes des discussions politiques ou d'affaires.

Le patrimoine littéraire et culturel européen s'est constitué, à travers les siècles, par des procès de communication interlinguistique et interculturelle. L'importance de la pratique de la traduction dans ce processus permet d'opposer à la maxime *traduttore traditore*, désormais surannée, la plus véridique *traduzione tradizione* (traduction tradition).

<http://www.fabula.org/actualites/article13029.php>

Merci à M. Martin pour cette apologie de l'anglais. Il nous sera permis de ne pas en tenir compte et de choisir le président en se basant sur d'autres critères.

## « Travailler en français »

*Après les accidents de radiothérapie déplorés à l'hôpital d'Epinal, la CFTC demande l'application scrupuleuse de la loi Toubon sur l'usage du français.*

**PARIS.** – La CFTC a demandé « l'application scrupuleuse » de la loi Toubon sur l'usage du français après les accidents de radiothérapie déplorés à l'hôpital d'Epinal causés, selon l'Agence régionale de l'hospitalisation de Lorraine, par une mauvaise interprétation d'un logiciel en anglais. « Il est de la responsabilité des pouvoirs publics de faire appliquer scrupuleusement la loi Toubon », souligne la confédération.

La mauvaise interprétation d'un logiciel en anglais, « sans mode d'emploi en français », est en cause dans l'accident de radiothérapie à l'hôpital d'Epinal, où quatre patients sont morts de surdosage, avait indiqué le directeur de l'ARH de Lorraine.

« De nombreux salariés français rencontrent des problèmes de ce genre chaque jour dans l'exercice de leur travail », en étant confrontés à « des textes dis-

ponibles uniquement en anglais » qu'ils ne comprennent pas, même si les conséquences n'en sont heureusement pas « toujours aussi dramatiques », explique la CFTC.

Plusieurs syndicats mènent campagne depuis plusieurs mois pour le « droit de travailler en français » sur le territoire national, soutenant des plaintes en ce sens de salariés contre des entreprises anglophones.

La « loi Toubon » du 4 août

1994 rend obligatoire l'emploi du français dans les entreprises, notamment pour « tout document comportant des dispositions nécessaires au salarié pour l'exécution de son travail ».

Une proposition de loi actualisant ce texte a été adoptée par le Sénat à l'unanimité en novembre 2005, afin de tenir compte des évolutions des technologies et de la mondialisation. Elle attend depuis d'être étudiée par l'Assemblée nationale.

L'EST REPUBLICAIN - 15 mars 2007

### **Le Pays Briard**

## Maurice Sujet n'est plus

Avec la disparition de Maurice Sujet survenue le 29 novembre dans sa quatre-vingt septième année à Coulommiers, c'est tout un pan de la vie intellectuelle de la Brie qui s'en va. Maurice Sujet avait consacré sa vie à sa passion : l'espéranto, cette langue internationale, outil d'une grande richesse, qu'il s'efforça de promouvoir "comme une noble cause humaniste" et à enseigner comme il le disait lui-même "permettant une parfaite expression de la pensée dans tous les domaines, autant scientifiques que littéraires". L'espéranto vient de perdre un de ses plus ardents défenseurs.

Ses articles sur le sujet furent nombreux dans les colonnes du *Pays Briard*. Son dernier papier en date publié dans le journal du 27 octobre saluait un autre espérantiste disparu, Jacques Dorrer. Maurice Sujet notait cette langue qui "permettait à de simples hommes de correspondre parfaitement, en toute légalité et en toute vérité, avec d'autres hommes du monde entier"

### Directeur du collège Hippolyte Rémy

En 1970, Michel Vincent accueillait avec bienveillance les articles que Maurice Sujet déposait au journal : "L'espéranto, c'est la langue de l'espérance. Apprendre l'espéranto c'est entrer dans la grande famille de ceux qui cherchent à mieux se connaître pour mieux se comprendre et mieux s'aimer" écrivait le directeur du *Pays Briard*.

Maurice Sujet a vu le jour à Jouy-sur-Morin en 1920. Il vint

étudier à Coulommiers, au Cours Complémentaire, après avoir été élève de l'école communale.

Après avoir réussi brillamment ses examens à l'Ecole Normale de Melun, il fut nommé professeur au C.E.G. de Coulommiers en 1939, exerçant en mathématiques, sciences et histoire.

A la rentrée scolaire de 1966, il prit la direction du collège Hippolyte Rémy, établissement où il fut l'élève de tous ses prédécesseurs dont Hippolyte Rémy lui-même, créateur du Cours Complémentaire. Il dirigea cet établissement columérien au cours d'une carrière fructueuse avec une qualité de méthode et d'organisation reconnue.

### Eminent spécialiste de l'espéranto


Plus disponible, il se consacra à l'espéranto en devenant l'ardent défenseur et l'éminent spécialiste.

Maurice Sujet se plaisait à citer Maurice Genevoix : "L'espéranto est une langue naturelle et souple, en mesure d'exprimer les nuances les plus subtiles de la pensée et du sentiment. Il est propice à permettre l'expression la plus juste, la plus littéraire, la plus esthétique et de nature à satisfaire les esprits les plus exigeants".

Nous rappelons cette réflexion en guise d'hommage à cet homme, à l'esprit clairvoyant, qui n'a eu de cesse d'œuvrer pour tenter de réussir à sauver ce qui pouvait l'être encore, des cultures humaines et de leurs langues.

G. R.

## funebro



La 24-an de januaro forpasis s-ro **René Llech-Walter**, kiu festis sian 100-an naskiĝdaton la 30-an de marto pasintjare.

Ekde 1932 ĝis sia morto li estis delegito de UEA en sia hejmurbo Perpignan en Francio. Li estis estrarano de UEA 1955-1964 kaj prezidanto de *Unuiĝo Franca por Esperanto* 1957-1967, kiu poste elektis lin honora prezidanto. Li estis dumviva membro de UEA kaj de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista.

Llech-Walter estis konata kultur-aganto inter katalunoj en Francio. En 1982 la franca edukministerio rekonis lian aktivadon per sia plej grava distingo, la rango de Komandoro en la Ordeno de Akademias Palmoj. Ĉambro en la Centra Oficejo de UEA portas lian nomon memore al lia kontribuo por aĉeti la domon de la Asocio en Roterdamo komence de la 60-aj jaroj.

### Specifa mesaĝo de Jean-Louis Texier

“ Tre estimataj geamikoj,

... mi bedaŭras esti la peranto de neagrabla novaĵo. Nia kara kaj altestimata prezidinto René Llech Walter, kies cent-jarecon iuj el ni solenis antaŭ dek monatoj, mortis lastan nokton.

La t.n. maljunaj generaciuloj havos penson pri homo, kiu konis kaj laboris kun familianoj de L.L.Zamenhof, kiu reprezentis nian lingvon en diversaj gravaj cirkonstancoj dum pluraj jardekoj, kiu akumulis en sia laborvivo diversajn titolojn, ne nur en esperantujo sed ankaŭ loke ĉe sia kataluna lingvujo, kiu donis sian nomon al unu el la grandaj salonoj en nia Roterdama Sidejo,...

Vi povos legi amplekse pri li en la numero de *Franca Esperantisto*, kiu eldonitis okaze de la centjariĝo de UFE. Ŝajne ni vidis lin apud ni lastan fojon en la nacia kongreso en urbo Lille.

Mi fieras posedi leteron de li al la esperantistoj, en kiu li kuraĝis raporti pri preskaŭ sia tuta vivo, eĉ aludante per humila pardonpeto al eraraj cirkonstancoj ofte al li riproĉitaj ».

“ *Bonan vesperon René* ”

Jean-Louis Texier



[ ... / ... ]

... Okaze de la centjariĝo de Llech Walter, iu JLT, kiu ĉiam konservis bonajn rilatojn kun li pro oftaj renkontoj en la sudo mem ( kie li havis kelkajn jarojn libertempejon ), JLT do sugestis al la eksprezidantoj de UFE fari komunan leteron al RLW por saluti lin iom escepte. Ĉiuj konsentis... *Albault, H.Gonin, Texier, Triolle, Moon, Longue Epée kaj Flochon.*

Mi ( JLT ! ) preparis grandan folion, kiun mi dividis en sep partojn, kaj tiu-ĉi rondiris dum 5 semajnoj de loko al loko, kaj revenis al mi bone plenigita, kaj mia edzino ornamis la paperon kaj la koverton, kaj ni sendis la tuton al René, ekzakte je la dato de lia centjariĝo. Tio multe plaĉis al li ; mi vokis lian filinon, por ke ŝi faru foton [ ... ... ]

L' Union des Poètes francophones est heureuse et fière d'avoir octroyé à monsieur **René LLECH-WALTER**, à l'occasion de son centième anniversaire, le titre d' Aède d'Honneur de la Francophonie.

Poète, humaniste, René LLECH-WALTER est (entre autres) *commandeur de l'ordre des Palmes académiques, grand Prix humanitaire de France, chevalier du Mérite social, officier de l'Ordre des Arts et Lettres, président de l'Union française pour l'espéranto, président d'honneur de l'Association Polytechnique, vice-président de la Fédération française des Universités populaires, majoral du Félibrige, président des Gais Troubadours catalans, maître en Gai Savoir et mainteneur de l'académie du Genêt d'or...*

Cette distinction lui a été remise par notre délégué Claude-Marcel WILLERS, président du *Groupe poétique et artistiques du Roussillon*, lors d'une cérémonie qui s'est tenue à Perpignan le 30 mars, en présence des autorités de la ville et du département.



### Rekomendinde

Last-somere, mi legis 4 bonajn librojn kaj mi volas dividi kun vi mian entuziasmon por tiuj libroj.

#### 1- "Ebony" de Ryszard Kapuściński.

Mi jam aŭdis kelkajn laŭdojn pri tiu libro, do kiam oni proponis al mi elekti libron pro rekompenco en la jarfina konkurso de enigmoj de "la informilo" 136, mi elektis ĝin dum la staĝo de Nancio.

La sorto volis, ke mi legis ĝin etape pro tro granda okupiteco. Tamen ĉiujfoje, kiam mi trovis minutojn por legi ĝin, mi retrovis la saman plaĉon kaj mi finis la legadon en Rumanio.

*Ebony* estas libro pri Afrika vivo kaj afrikaj problemoj, sed ĝi ne estas iu ajn libro pri Afriko. Pro la fakto ke *Ryszard Kapuściński* estas pola ĵurnalisto kaj pro la fakto ke Pollando neniam estis engaĝita en koloniismo, la ĵurnalisto rigardas Afrikon per neŭtralaj kaj sinceraj okuloj. Pro sia statuto de ĵurnalisto, li povis aliri al granduloj, sed ankaŭ povis tutsimple troviĝi meze de popol-amaso aŭ dormi ĉe simplaj bazaj civitanoj kaj kontakti mizerulojn.

Vi ricevos ŝokon, kiam vi legos tiun libron, tiom kiantan pro sincero. Vi konatiĝos kun aŭtenta Afriko, stranga kaj fascina. Pro la fakto, ke li pli ofte vizitis landojn en krizaj situacioj, lia rigardo al Afriko ne estas ĉiam roza, sed tiom unika kaj sincera, kaj simpatio-plena. Dum mia preparo de tiuj linioj, mi eksciis, ke *Ryszard Kapuściński* ĵus mortis. Grandan penon mi sentis.

Kiu ne povas legi "*Ebony*"-n en esperanto povas legi ĝin en la franca sub la titolo "*Ebène*" eldonita ĉe *Plon* (Mi ĝis nun ne legis la francan version).

Mi ŝatus kopii pecon de tiu libro, sed mi ne plu havas la libron, ĉar mi donacis ĝin al Julia en Rumanio, antaŭ ol foriri.

#### 2- "Erik, aŭ la malgranda insektlibro" de Godfried Bomans

Tiu libro estis donacita al mi de *Lenke*, kaj mi rave legis ĝin dum mia restado en *Praid*.

*Godfried Bomans* estas nederlanda aŭtoro, ne sufiĉe konata. La aludita libro estas tradukita de esperanto-klubo *Purmerend*, Nederlando

*Erik* estas knabeto, kiu magie malgrandiĝis ĝis grandeco de insekto, kaj partoprenas ilian vivon dum kelka tempo, povas paroli kun ili, ĉar ankaŭ la insektoj parolas, kvankam gardante ĉiujn siajn ecojn de insekto. La libreto estas samtempe instrua (jes, la aŭtoro ne tro friponis priskribante la vivon de insektoj) rava, filozofa kaj pensiga, kaj samtempe tre humura. Tiu libro pensigas min jen pri "*Alice en Mirlando*", jen pri "*La eta princo*", kelkfoje pri la filozofaj fabeloj de *Voltaire* aŭ de *Swift*. Sed pli bone, ke mi kopii por vi pecon de la libro:

#### "Erik" p.70-71

(La raŭpo loĝas ĉe la hotelo de la heliko)

"Sinjoraj moŝtoj"... la heliko parolis per tremanta voĉo... okazis krimo. Sinjoro Raŭpo sidas tute ligita en angulo de la ĉambro".

Oni silentis pro teruro; sed Eriko komencis klare vidi.

"Tio estas krizalido, li diris.

- Kio? demandis la heliko.

- Krizalido aŭ kokono, ripetis Eriko... kiam la raŭpo deziras fariĝi papilio, ĝi enŝpinas sin kaj fariĝas krizalido. Post kelka tempo ĝi eliros kaj estos papilio".

"Tion mi ne komprenas, diris la sterkoskarabo.

- Ankaŭ mi ne tute, diris Eriko... tamen estas vere. Oni povas legi tion en *Solms*. (aŭtoro de lia klas-libro pri insektoj).

"Jes, sed kial tiu kaprico okazas ĝuste en mia hotelo? vokis la heliko... ĉu la sinjoro ne povas elekti por tio alian lokon?"

- Ne, okazas impulse, diris Eriko... kaj tiam oni ankaŭ ne plu povas malhelpi tion. La raŭpo fariĝas dormema, ĝi ne plu manĝas, ŝvingas la kapon supren-malsupren...".

- Ĝuste kion mi diris... interrompis la araneo, ... mi jam delonge rimarkis tion".

"Ŝvingas la kapon supren-malsupren... daŭrigis Eriko, kiu sciis tiun parton de *Solms* parkere, inkluzive la malgrandajn literojn... kaj retiras sin en malluman, prefere senventan, angulon. Pli grandaj specoj eĉ enfosas sin en la teron. La teksaĵo de la kokono estas finfarita post kelkaj horoj, tiam komenciĝas la tiel nomata krizalidiĝo, kiu varias de du ĝis ses semajnoj, depende de..."

"Pardonu, interrompis la heliko, ... kion vi diris, du ĝis ses semajnoj? Kaj ĉu mia plej bona ĉambro restos okupata dum tiu tuta tempo?"

- Estas konsilinde, ne ĝeni la krizalidon, neniamaniere" finis Eriko, citante la lastan frazon de *Solms*, ... vi do ne tuŝu ĝin".

"*Solms* tute ne estas mia afero" diris la heliko, ... mi devas ricevi mian monon".



- *Kalkulu nur la duonon de la pensionprezo, proponis la abelo, ... ĉar la sinjoro nenion manĝas kaj ankaŭ ne bezonas servadon.*"

"*Tiel simpla la afero ne estas,*" opiniis Eriko, ... *ĉar kiu do pagu? La raŭpo jes loĝis tie ĉi, sed li ne plu estos tie ĉi, kaj la papilio, ĝi estos tie ĉi, sed ĝi ne ĝuis loĝadon.*"

"*Mia kapo turniĝas,*" diris la heliko, ... *mi ne plu povas kompreni.*" Kaj surloke kie li staras, li retiris sin en sian domon por konsiliĝi pri la afero.

Ginette MARTIN (recenzoj sekvotaj)



### Malrekomendinde

Mi ĵus ricevis la "Gazetaran Komunikon #256", kaj konsterniĝis vidi, ke en 12a loko de furorantaj libroj ĉe nia *Libroservo* troviĝas la dudirekta *Pocket Esperanto Dictionary* de *Andrew McLinen*. Mi posedas nur la unuan eldonon (1992) de tiu libraĉo, kaj miaj rimarkoj do limiĝas nur al tiu eldono – sekve, se la amasego da tieaj eraroj estis korektitaj en posta eldono, miaj rimarkoj havas nenium valoron kaj estas ne atentendaj.

Pro elĉerpiĝo kaj manko de ĝisdatigo, eventuale ankaŭ represo, de la konata kaj pli fidinda vortaro de *Wells*, tiu dudirekta angla-esperanta vortaro de *McLinen* estas nun la sola relative facile aĉetebla vortaro sur la anglalingva libromarkato. Mi taksas ĝin inter **la plej malbonaj kaj nefidindaj vortaroj**, kiujn mi iam ajn vidis dum mia 40-jara kariero kiel profesia lingvo-instruisto, kaj estas vera skandalo, ke UEA permesas al si vendi tian aĉegan varon !

La eraroj estas de pluraj specoj - mi donu nur kelketajn ekzemplojn:

- **ellasiaĵoj**: ekz. en la listigo de mallongigoj "*Abbreviations*" mankas laŭ mia kalkulo ĉ. 19 mallongigoj efektive uzataj en la vortaro !

- **misaj informoj**: en la klarigo pri la *16 Bazaj Reguloj* troviĝas la aserto 10/16: *The accent is always on the last syllable*. Sed sur la kontraŭa paĝo troviĝas la informo: *The accent allways [ notu la misan ortografion! ] falls on the last syllable but one*.

- **preseraroj**: collective [>collective], alphabetical [>alphabetical]...

... / ...

(NB el la redakcio de "La I-o": Brian listigas pli ol 20 vortojn... komencantajn per la litero A !...)

... / ...

- **uzo** de nekzistantaj (aŭ dialektaj?) anglaj vortoj: abaca, ait [=insuleto] (netrovebla en mia dikego angla vortaro), alga (singularo de la listigita 'algae', sed apenaŭ uzata), beaut [ beauty], blaeberry [regionalismo; pli kutima estus 'blueberry'], blommer (netrovebla en normala vortaro), bofus (netrovebla) [ bogus?],

- **fakesprimoj** netaŭgaj por poŝvortareto: aliquot part, are [=aroo aro, 100 kv. m], brent-goose=berniklo,

- **fremdulaj esprimoj**: all above [ above all]

- **misaj difinoj**: bawd = firakonto!, blue = malŝpari, fordrinki, bye (-bye) 'excl!' ['excl' ne troviĝas en la listo de mallongigoj]

- **alfabeta misloko** de vortoj, kvankam laŭ la klarigo la vortaro sekvas "strikte alfabetan ordon".

... / ... Kaj tio estas nur elekto el inter la literoj 'A' kaj 'B'! La sangopremo estas jam tro alta por daŭrigi!

Mi proponas, ke oni trovu ian ajn pretekston por bruligi la tutan restantan stokon okaze de la laŭvica valpurga nokto, aŭ kiel eron por la fajrego vespere de la Johano-Baptista festo, aŭ almenaŭ klopodu komisii iun ĵetegi ilin noktomeze en la plej apudan roterdaman kanalon. Ankaŭ kaj/aŭ alternative ke oni provu persvadi iun en tria/dua-monda lando ( Ĉinio?) nigre foto-represi la oble pli bonan *Wells*-an vortaron, se estas iaj problemoj havigi laŭleĝan eĉ senŝanĝan represon ĉe la nuna eldonisto.

Hontu la verkinto de tiu vortaraĉo ( kaj hontu ankaŭ UEA por vendi tian subnorman varon jam dum jaroj! ) Mi ĝojegus legi, ke oni elsarkis ĉiujn erarojn el la dua eldono.

... ..

Dankante vian paciencon por tralegi la mesaĝon, amike salutas

via *Brian Kaneen*


\*\*\*\*\*

**Vancouver**: <http://esperanto.memlink.ca>

KEA: <http://www.esperanto.ca/kea>

"*Siempre la lengua fue compañera del imperio.*" Antonio de Nebrija, *La Gramática Castellana*, 1492.

"*Wer fremde Sprachen nicht kennt, weiß nichts von seiner eigenen.*" J. W. von Goethe.



## MUSEE NATIONAL DE L'ESPERANTO DE GRAY (70100)

Fondé à l'initiative de Géo JUNIER, ce musée a été inauguré en 1987 en présence du consul de Pologne.

Situé au premier étage de la « *Maison pour tous* », 19 rue V. Hugo, il offre au visiteur un itinéraire de 75 mètres en 10 salles de 230 m<sup>2</sup> ... proposant une riche bibliothèque de 6000 titres de livres ou brochures, 1400 titres de journaux, revues, bulletins parus ou actuels. On y découvre une documentation quasi exhaustive sur les associations locales et régionales, ainsi que sur les espérantistes disparus. Une collection d'objets divers relatifs à la langue complète ce trésor culturel de grande valeur.

Le musée est ouvert toute l'année. De février à novembre de 14h à 17h. Visite de groupes possible.

Contact : [michelinechateau@wanadoo.fr](mailto:michelinechateau@wanadoo.fr) - tél 06 21 51 38 89

Laŭ iniciato de Geo Junier, la muzeo estis inaŭgurita en 1987. Ĉeestis la pola konsulo.

Je la unua etaĝo de la « *Maison pour tous* » ĝi proponas al la vizitantoj 10 salonojn -areo 230 m<sup>2</sup>-, laŭ itinero 75 metrojn longa ! Riĉa biblioteko enhavas 6000 titolojn de libroj aŭ broŝuroj, 1400 titolojn de gazetoj, revuoj, de pasintaj kaj aktualaj bultenoj. Oni ankaŭ malkovras plenan dokumentaron pri lokaj kaj regionaj asocioj, pri forpasintaj esperantistoj. Abunda aro da diversaj objektoj pri la lingvo kompletigas tiun kulturan, altvaloran trezoron. .

Muzeo malfermita dum la tuta jaro ( februaro / novembro : 14 / 17h ). Ebla akcepto de grupoj.

... La muzeo indas je via vizito ! ...



...à suivre ! ...

( communiqué jefo-membroj )

Salut à tous!!

Pour infos, Ségolène ROYAL a publié ses *cahiers d'espérance*, synthèse des débats participatifs... l'eo au bac y est mentionné. ( page 573 ).

A l'intérieur de la rubrique [[1. Construire une autre école garantissant la réussite scolaire et l'épanouissement des élèves. Propositions issues des contributions locales et des forums internet...  
A. Réforme des rythmes scolaires et de la pédagogie]]... on trouve le point suivant:

- **Espéranto en langue facultative au bac** et meilleur enseignement des langues étrangères ( voyages, cours audio-visuels...)



Pour télécharger:

[http://www.desirsdavenir.org/actions/telecharge\\_cahiers.php](http://www.desirsdavenir.org/actions/telecharge_cahiers.php)

Fabien TSCHUDY

Il est cependant opportun de conseiller à nos lecteurs la lecture d'un échange de courriels entre Ségolène et Francis Bernard, rédacteur de la revue « *Espéranto-info* ». S'y ajoute un argumentaire de complément rédigé par Henri Masson : « *Ségolène Royal et la communication linguistique – Le modèle scandinave qu'elle préconise n'est pas applicable à l'Union Européenne* »

Deux pleines pages à découvrir sur le site [www.esperanto-sat-info](http://www.esperanto-sat-info). ( colonne de gauche, service de presse : cliquer sur 2007 ).

... extrait du « site de campagne » de José Bové

IV Education, Culture, Médias :

Engager, avec les parents et l'ensemble des citoyens, une réforme profonde du système d'éducation (valeurs, méthodes, moyens humains et financiers) Dégager ces secteurs de la Marchandisation et de la Pub et développer la culture vivante Donner des moyens réels aux Universités et à la Formation Permanente Enseignement de l'Espéranto comme deuxième langue en Europe dès le primaire. Education philosophique dès le primaire puis enseignement de la philo dès le collège

# Aviation : la langue dangereuse ! . . .



*Un superbe exemple de discrimination linguistique par l'anglais, en Inde. 15/02/07 - 25 pilotes interdits de voler à cause d'un faible niveau d'anglais*

L'Inde a interdit à quelque 25 pilotes de ligne étrangers de voler dans son espace aérien à cause de leur mauvais niveau d'anglais, a indiqué jeudi l'Aviation civile, au moment où le transport aérien dans le pays est en plein essor.

"Environ 560 pilotes étrangers ont volé dans le ciel indien l'an passé et entre 20 et 25 qui nous ont approchés pour faire valider leurs licences ont été renvoyés", a dit le directeur général de l'Aviation civile, Kanu Gohain. "Ils venaient pour la plupart des pays d'Europe de l'Est, de la Communauté des Etats indépendants (CEI) et d'Indonésie", a-t-il précisé au cours d'un séminaire sur la sécurité aérienne.

"Une compétence en anglais est exigée puisque c'est la langue mondiale de l'aviation", a-t-il rappelé, mettant en garde les nouvelles compagnies aériennes à bas-coûts indiennes. "Une action pénale sera engagée si les transporteurs aériens violent les règles de sécurité", a dit M. Gohain.

En novembre 1996, 349 personnes avaient péri dans la collision près de New Delhi entre un appareil d'une compagnie saoudienne et un avion du Kazakhstan, dont les pilotes comprenaient et parlaient mal l'anglais.

( belga )



L'article du 25 février sur les 25 pilotes indiens interdits de vol à cause de leur faible niveau en anglais m'a amusée et courroucée.

